MONDSINDIKATISTO ESPERANTO

NU : TUTMONDIGU
NI
LA KLASBATALON!!!

5-6/1995




Dume ĉe FGTB-ESPERANTO, c/o ATAC, 59+, rue A. Bastin, B-5000 NAMUR (Belgio)

Al ĉiuj tra la tutmondo:

SUKCESAN 1-AN DE MAJO KLASBATALAN ! ! !


* * *


Al la francaj gekamaradoj de F.E.T.:

ELKORAN BONVENON EN NAMURON, BELGIO ! !

FRUKTODONAN ĈEFASEMBLEON EKSTERFRANCIAN!

F.E.T.





ASSEMBLEE GENERALE

DE LA FEDERATION ESPERANTISTE DU TRAVAIL

DU JEUDI 25 AU DIMANCHE 28 MAI 1995

AU CENTRE CULTUREL MARCEL HICTER LA MARLAGNE A QUELQUES KM DE NAMUR BELGIQUE

# VERE LIBERIGANTAN, PLENE SENNACIIGANTAN 1-AN DE MAJO !!!



El LES NOUVELLES DE MOSCOU № 11 (2218) 12 mars 1989 — Dessin d'Igor Smirnov

La sennaciistoj ne povas ignori la ekziston de klasoj, kaj volonte mi konsentas kun Marks, ke la klasbatalo estas unu el la faktoroj de socia progreso. Kiam subpremitaj klasoj rezignas batali por atingi pli bonajn laborkondiĉojn, pli dignan situacion en la socio ; kiam homoj perdis aŭ neniam akiris senton pri justo, egalo (pli ĝuste : ekvivalento) kaj libero, tiam la klasoj eĉ aliiĝas en fermitajn kastojn, kiel ekzemple en Hindio, kaj la tuta civilizo en la koncernaj landoj povas stagnadi dum multaj jarcentoj. Necesas, ke fremda elemento - ordinare per invado - penetru tian civilizon, por ke ĝi povu retrovi aŭ akiri la emon al ŝanĝiĝo, al antaŭeniro. Socioj laŭklase organizitaj, mondo laŭnacie dividita, en tio kuŝas la kaŭzoj de malpaco, de milito. La sennaciistoj devas ne nur akceli la malaperon de ĉiuj nacioj, sed ankaŭ la starigon de la regno de l'justo, de la egalo, unuvorte de l'homeco.

(E. Lanti)

HURA! TUTMONDE KAJ SUKCESE JA SUPERTENDENC-ADAS SAT-ANOJ!

El Japanio alvoko anarki-tendenca kontraŭ SONY inkluzive en Meksikio

... En Belgio nacilingve (france) aperis en komunista organo

sois. Néanmoins, LeVif élude la question principale. D'où vient cette poussée d'extrême droite ? Pour moi, la bourgeoisie a deux moyens de nous gouverner : 1. la démocratie parlementaire, où tous les partis s'inclinent devant les diktats des multinationales, des banques et des gros financiers. 2. Quand les travailleurs se révoltent, alors on voit un renforcement des forces de répression, des droits "démocratiques" de plus en plus réduits et sous le fascisme, complètement supprimés.

**E. D.**
**Hainaut.**

## *Lutte sans frontières....*

**Depuis la révolution industrielle, les travailleurs et le peuple japonais se battent. De nombreux anarchistes, communistes, religieux, petites gens et aussi espérantistes ont résisté aux diverses guerres et politiques d'agression. Beaucoup y ont perdu la vie. A présent, des dizaines de milliers de cheminots luttent contre les licenciements consécutifs au démantèlement de la SNCJ et à la privatisation de ses plus beaux morceaux dans le cadre du projet TGV local. La revendication des travailleuses chez Sony à Nuevo Laredo (Mexique) - ne plus travailler le samedi et le dimanche - encourage les travailleurs japonais qui ont perdu des collègues à cause du «karochi» (mort par surmenage au travail). La revendication d'élire ses propres délégués rend l'espoir au peuple japonais qui désespérait de la politique. Bien des Japonais ne reçoivent pas une information suffisante sur la lutte des zappatistes, des paysans et des ouvriers mexicains. A Sapporo, au Japon, comme à Mexico-City, nous avons entamé la lutte contre le géant Sony. Ailleurs au Japon, aux Etats-Unis et en Europe, nos amis aussi ont commencé le combat simultanément contre Sony et le gouvernement mexicain. Nous appelons tous les partisans du changement de par le monde à organiser des manifestations de masse contre Sony, le gouvernement mexicain et ses homologues japonais et nord-américain. Plus de frontières entre les travailleurs !**

**Groupe SAT de Sapporo, Association de jeunesse Hokke No Kai et réseau anarchosyndicaliste d'Hokkaido, Japon.**

## *On ramone gratis !*

**Entièrement au service des patrons et des partis bourgeois, certains journalistes "libres" mènent la danse. Parfois même, en invoquant des arguments écologistes et/ou pour la défense de l'emploi. Ainsi, La Nouvelle Gazette (Charleroi) expliquait que la Belgique pourrait gagner 4.000 emplois, faire 6 milliards de chiffres d'affaires et 2,4 milliards en recettes TVA. Tout simplement en rendant tout à fait obligatoire la loi de 1978 relative au contrôle des installations domestiques de chauffage et au ramonage annuel des cheminées. Par le recours, évidemment, aux professionnels et au tarif que l'on sait.**
**L'article n'explique pas où les exclus du travail, du chômage et du minimex qui représentent déjà quelque 20 % de la population iront chercher, chaque année, l'argent nécessaire...**
**Il faut déjà payer pour se nourrir, se vêtir, se loger, se chauffer, se soigner, s'instruire, se déplacer, sans compter les taxes multiples, les hausses constantes qui étouffent de plus en plus la population.**
**Dans la belle économie de marché capitaliste, même les crève-la-faim vont bientôt devoir payer ne serait-ce que pour pouvoir respirer...**
**Et dire que certains prétendent qu'elle est la société triomphante de demain ! Il faut être fou !**
**En réalité, c'est la dictature du fric où absolument tout repose sur l'argent et où tout se paie même pour ceux qui ne possèdent rien, ou presque.**

**Roger Romain,**
**Courcelles.**

FAU

# Freie Arbeiter- und Arbeiterinnen Union: germania sekcio de la Internacia Laborista Asocio.

# Ĝisdatigo

n-ro 1

februaro 1995



FAU-IAA GeKo (=Kunordiga Komitato), c/o Buchladen "Le Sabot", Breite Str. 76, D-53111 Bonn. Telefono kaj telekopiilo: +49-228-695193.


Karaj kamaradoj!

Jen la unua numero de nova informa bulteno, kiu ekde nun aperos proksimume kvaronjare. Ĝi respegulas la aktivecojn de FAU, celante pli bonajn internaciajn kontaktojn kaj pli fortan informofluon en la anarki-sindikatista kaj parencaj movadoj. Ni ne forgesu, ke anarkio povas progresi je tutmonda skalo nur per Esperanto!

Averto: en junio 1995 probable estos elektita nova kunordiga komitato en alia urbo, do la adreso verŝajne ne validos post junio 1995! Post tiu datumo skribu pere de la redaktoro de ĉi-tiu bulteno:


Will ("Volo") Firth, Lychener Str. 73, D-10437 Berlin. Telefono kaj telekopiilo: +49-30-4448398.


---

## BONVENON!



La tutan aferon sukcese iniciatis la japana anarkisindikatista reto (c/o OGAWA Tetuo, 10-12, Ochikawa, Hino-si, TOKIO), kies bultenon al "LABORISTA SOLIDARECO" E-resumis SAT-ano 32529 (t.e. SATO Eiĵi, Hatiken 10, Higasi 2-2-11, Nisi-ku, JP-063 SAPPORO-si).

Nun same okazas ele de la germania "DIREKTE AKTION" (=Rekta Agado) dank'al SAT-ano 33300 (nome K-do FIRTH Will, ĉi-supren), dum alia grava agento certe estas SAT-ano 30060 (PERSSON Pelle, Svartviksvägen 14, SE-12 352 FARSTA), sindonema eldonanto de la sveda "S.L.E.A.-INFORMILO" kun oftege prisindikata enhavo.

CERTE APARTE FIERAS "MONDSINDIKATISTO" PRO TIA EKFLORADO DE NIA E-GAZETARO SINDIKATISTA !!! (s) SAT-ano 33027 A.Mo.

## Kio estas F.A.U.?

Unua numero de "F.A.U.-ĜISDATIGO" trafe prezentas la germanian sekcion de Internacia Laborista Asocio (I.L.A.) samokaze substrekante, ke de komence de 1994 ekaperis en "DIREKTE AKTION" seria E-kurso (elstare ekzemplodona, ĉu ne?). Kompreneble kerne estas la resumita enhavo de l'ĉapitroj "EUROPA UNUIĜO POLICA" (pri la Essen-a eùropinto), "ĈU HAVAS SENCON FONDI STUDENTAN SINDIKATON?" (ideal-a agadkampo por studentoj en F.A.U.), "ESCEPTA KLAUZO MALSEKURIGAS LA VIVTENON" (unue ĉe la aùto-konzerno VW), "SEKSA MOLESTADO EN LA LABOREJO", ktp ... ĝis "RUBRIKO "MIKSAJOJ" (7-a sekvo de la tiom ekzempla seria E-Kurso).



EK, LA ANARKI-LABORISTOJ KAJ (nu: ĉu finfine eĉ ne ĉefe?) -LABORISTINOJ !!!

Atentu la perversecajn efikojn de iu "eùropa konstruado" !




## ATENTU EURORASISMON !

Animanto de la Asocio Laboro Amikeco Kulturo (ATAC /pron. ATAK/ laù la franca) K-do André MARTIN inaùguris 1995.03.27 en Namur gravan ekspozicion de kontraùrasismaj karikaturoj, reliefigante antaù la ĉeestantaro - lia ministra moŝto Bernard ANSELME, almenaù du skabenoj, aro da instruistoj k. sindikatistoj, ... - du aparte notindajn laù li erojn de la kontraùrasisma batalado.

Unuflanke, pro tio, ke "bedaùrinde ĉe la laboristaro spontanadas nek internaciismo nek solidaro": la ĉiutagan lukton sine de l'labormondo mem por tie "paŝo post paŝo kontraùbatali rasismon kaj ksenofobion" celante "senrasismajn entreprenejojn, laboristajn organizaĵojn, sindikatajn domojn" ĝis tio, ke "la tuta laborista movado iĝu fortreson senigitan de tiuj fiplagoj de la hormaro". Tia ĉiutaga agado aktivula des pli nepras, ke "nek nature interhelpa, nek definitive vakcinita tiurilate estas la laboristaro".

Post pluraj trafaj ekzemploj pri tio, K-do MARTIN substrekis la nunajn danĝerojn eble tuj naskotajn de iu "Eùropa konstruado mem".


(Dorsen)

.../...

"Sendube des pli necesas trafe ekkoni la nunan momenton de l'kontraù-rasisma luktado (...). Spite iujn sekvojn pozitivajn - kiel ekz. la pli-boniĝadon de la interrilatoj kun la Germanoj - la eùropa konstruado pov-us, kaze ke ni ne atentus,ankaù naski perversecajn efikojn pro la pli k. pli forta kultado al la eùrocentrismo (k. rilate tion mi pensas ne nur pri la geografiaj kursoj kun iliaj platglobo j konstante kun la greenwich/ grinùiĉ/ -a meridiano kiel umbiliko de l'tutmondo ...). Temas ja pri tiu tuta historiografio kultadanta kaj disvolvanta la miton pri iu Eùropo "rifuĝejo de l'paco kaj de l'prospero", "lulilo de l'civilizacio kaj de l'demokratio", "tutmonda patrino de l'homrajtoj" kaj -kiel konate- planet -skala kundefendanto de duba "Tutmonda Nova Ordo".

"Ni malfidu kvazaù peston k. aideson tiun ideologian drivon al iu EURO-RASISMO, cetere jam enkorpiĝanta en novajn diskriminojn, ĉifoje inter la enmigrintoj mem: la "bonaj" - tiuj el la eùrouniaj landoj - k. aliaj: la "tre" alilandaj, kvazaù invademaj barbaroj.

"En la ĉeno de l'generacioj,ĉe la vojkruco, ni akurate ekkonsciu la tutan brulecon de l'nuntempo kun ĉiuj ties vetaĵoj: EUROPON JA NI KONSTRU-ADU sed plibonigante ĉion necesan; GIN NI PLIVASTIGU (eventuale "de At-lantiko ĝis Uralo") SED, mi petegas, ĈEFE NI NE ENFERMIGU EN GIN! Kiel Mondcivitanoj k. demokratoj ni havus nenion por gajni ĉe Eùropo iĝanta ankaù se ne eĉ unue tiun de l'fipolicistaro kaj landargardistaro !!!

André MARTIN.




... Car ĉe la laboristaro "spontanadas nek internaciismo nek interhelpo" (foje inkluzive inter samlandanoj, kiel Valonoj (la gaùla koko) kaj Flandroj (la ĝermana leono) ...).

# OFERON POR SUFERANTOJ PRO GRANDA TERTREMO EN KOOBE!

12/feb/95

Granda tertremo atakis Koobe kaj viktimigis ĉ. 5300 en la 17-a de januaro. Preskaŭ ĉiuj evitis supozi, ke granda tertremo povas okazi en Kansaja regiono, malgraŭ tio, ke ĉiuj scias, ke Japanaj Insuloj estas sur tertremozono. La porprofita politiko de la burokrataro kaj longatempaj konservativaj registaroj ŝanĝis la urbon en danĝeran. Kaj la burokrataro malfruigis la savadon. Ili eble murdus duonon da la viktimoj. Precipe malriĉuloj suferis. Kelkaj regantoj deziras fortigi aŭtoritaton de la armeo profitante la okazon. La tertremo malkovris gravajn sociajn problemojn en Japanio.

Suferantoj vivas mutualisme kaj multaj volontuloj helpas ilin. Ni petas monoferon de vi. Ni proponas, ke vi donacu al suferantaj fizikaj handikaptuloj kaj fremdlandanoj. Ĉar estas pli malfacile ke ili ricevas ofermonon.

Helpa Centro Por Handikaptuloj(tel.:+81-6-981-7523, faks.:+81-6-981-7524); ĉe Iwamoto Koopo 705, 2-3-8, Higasi-Nakamoto, Higasinari-ku, OOSAKA, 537 Japan


JVC(ili donas informon por fremduloj, tel.:+81-3-3834-2388, faks.:+81-6-941-5875);
ĉe Marukobiru 6F, 1-20-6, Higasi-Ueno, Taito-ku, TOKIO, 110 Japan
(Menciu "monvarbado por tertremaj suferantoj".)

SAT-ana Grupo en Sapporo; ĉe MIYAZAWA Naoto, Asabu 1-13-13, Kita-ku, SAPPORO, 001 Japan

**ATENTU !!!**

Kune kun A.T.A.C., FGTB-ESPERANTO kaj André MARTIN "MONDSINDIKATISTO" havas de nun propran P.K.-on:
59 bis (aù 59 +)/Boîte 7, rue Bastin
BE-5000 NAMUR.
Antaùdankon zorge noti !!!

UNU MONDO
SAT
ESPERANTO
UNU LINGVO



*Kune kun ni ... knote aŭ buton-true*

FIERE PORTU LA RUĜE SAT ESPERANTO ĈIRKAŬITAN VERDSTELON !

*Dank' al internacia lingvo*

AL IU TRANSNACIA
INTER-KOMPRENIĜO :



ESTU, IĜU LABOR - ESPERANTISTOJ !

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
67, avenue Gambetta F-75020 PARIS

CSI — CFDT - CFTC - FO — CSC - FGTB — CHAMPAGNE ARDENNE CHARLEROI NAMUR

# Conseil Syndical Interrégional

## Charleroi-Namur/Champagne-Ardenne

*Aux métallos d'Allemagne, aux bons soins de leur syndicat:*

*Al la metallaboristoj de Germanio, z.d. ilia sindikato:*

I.G. METALL, LYONERSTR. 32, DE-60525 FRANKFURT/MAIN
(ALLEMAGNE) / FAX: 19 - 49/ 69 66 93 28 43

*Cher(e)s Camarades,*
*Réunis à la Bourse du Travail de CHARLEVILLE MEZIERES (France), les membres du CONSEIL SYNDICAL INTERREGIONAL (C.S.I.) franco-belge de CHARLEROI-NAMUR/CHAMPAGNE-ARDENNE, représentants des organisations régionales des confédérations belges et françaises affiliées à la CONFEDERATION EUROPEENNE DES SYNDICATS (C.E.S.), saluent la lutte exemplaire des métallos d'Allemagne et les assurent de leur totale solidarité.*

*A bas les politiques d'austérité sans fin!*
*Vive l'unité de combat des travailleurs d'Europe et du monde!*

*Karaj Gekamaradoj,*
*Kunvenantaj en la Labora Borso de CHARLEVILLE MEZIERES/Ŝarlevil Mezjer/, Francio, la membroj de la franca-belga INTERREGIONA SINDIKATA KONSILIO (I.S.K.) por CHARLEROI/Ŝarlerŭa/-NAMUR//CHAMPAGNE/Ŝampanj/-ARDENNE, reprezentantoj de la regionaj organizaĵoj de la belgaj kaj francaj konfederacioj aniĝintaj al la EUROPA KONFEDERACIO DE LA SINDIKATOJ (E.K.S.), salutas la ekzemplodonan lukton de la metallaboristoj de Germanio kaj certigas al ĉi tiuj sian tutan solidaron.*
*For la senfinajn politikojn konsumbridajn!*
*Vivu la batala unueco de la laboristoj de Eŭropo kaj tutmondo!*

*Charleville Mézières*
*1995.02.24*

*Elfrancigite de* MONDSINDIKATISTO — ESPERANTO

**EUROREGION**
CFDT-CFTC-CSC-FGTB-FO

Nu ĉu ne historiaĵo ?

Nome de Christian NOLLEVAUX/Nolvo/, sekretario de la FGTB-aj metallaboristoj de provincoj Namur kaj Luksemburg, proponis la ĉefdelegito de FGTB-Namur, André MARTIN, cetere Mondsindikatisto.
La tuta partoprenantaro tuj entuziasme senŝanĝe aprobis kaj la enhavon kaj la ideon sendi kun la E-versio kaj la tutan muntaĵon. Krom la CSC-anoj kaj FGTB-anoj tiel el Charleroi kiel el Namur: la FO-anoj el Charleville kaj el Reims (inter kiuj Jean-Marie COLPO/Kolpo/, kiu tuj sendis per sia faksilo) kaj la CFDT-anoj kun Francis VERITA, vicprezidento de la Regiona Ekonomia kaj Sociala Konsilio de Champagne-Ardenne.
Ĉiu delegitaro insiste mendis kopion de sia historiaĵo.

Nur kondiĉe, ke ili tutmondiĝu ...

J A ,   M U L T K A P A B L A S   L A   S I N D I K A T O J   !


Jam en la angla, portugala kaj franca aperis grava verko de l' t.n. "LISBONA GRUPO" sub gvidado de R. Petrella "LIMOJ AL LA KONKURENCIVO". Konklude: <u>kvar kontraktoj tutmondaj</u>: la kontrakto pri la bazbezonoj (forigo de l'neegaloj), la kultura kontrakto (tolero kaj interkultura dialogo), la demokratia kontrakto (al sistemo de tutmonda kondutgvido) kaj la tera kontrakto (eklaboro de l'tutmonda disvolviĝo).

Okaze de la apero de la franca versio, R. Petrella substrekis i.a.: "<u>Ni estas ja la tutunua tutplanedeca generecio. La naciecaj generacioj dediĉis pli ol cent jaroj por krei la nacian socialan asekuraron. Necesos tempo por anstataŭigi la konkurencivon per la kunlaborado sed nep-ras ke ni komencu. Ni multe kalkulas kun la socia societo. Estas 450 000 libervolaj organizaĵoj tra la tutmondo. La sindikatoj multkapablas kondiĉe, ke ili tutmondiĝu. Sed ne post 50 jaroj, hieraŭ!</u>".

Nu: ĉu ne kvazaŭ sennaciisme ? ...


----

Kaj samtempe: <u>LA IMPERIISMA INTERHELPO:</u> ...



*(<u>Le Soir</u>, Bruselo 1995.03.10)*

Le Soir du mardi 21 mars 1995




El SKAUGE, "KLASSEKAMPEN" (Klasbatalo) / NORVEGIO.

<u>LA</u> solvo, do ....

*SINDIKATISTOJ: EK, KUNE EN LA E-LABORON !*

*"La Merkato" 48 de aprilo 1995 ĵus sciigis, ke "pro manko kaj malsano de kunlaborantoj kaj pro diverĝo de opinioj pri pluraj terminoj inter la kunlaborantoj, bedaŭrinde la Sindik-ata Terminaro ne povis esti finfarita". Pro memoro, temis pri aldono de la E-terminaro al la oficiala vortaro de la EU-komisiono "Glosaro de l'labora mondo kaj sindikatmovado", en kiu aktive partoprenis "Mondsindikatisto". Kial ne kune findecidi, karaj gekamaradoj?*

<u>BRAVE KAJ DANKON!</u> - Je la ekvido de via titolo ĉe mia gazetarvendisto mi, kiel mondcivitano, antaŭtimis renkontiĝi kun kolekto da kokokrioj glore al "genieco" de iu lingvo kun em-fazoj patronismaj se ne eĉ rasismaj ("Niaj prapatroj, la Gaŭl-oj"...) kaj reeĥoj des pli ŝovinismaj ĉi-tie, "antaŭpostene" de la lingva limo kun ties interetnaj kvereloj kaj, laŭ iuj, ties obsedo spertadi "postkorto"-n kiel eble plej vastan. Feliĉe est-is la enhavo, tiom malkaŝe stempita per la prava bezono al mem-firmigo de niaj afrikaj geamikoj kun, en via numero 7-a, la klimakso laŭ mi: tiu rimarkinda klarvideco pri la vojoj kaj il-oj por kune antaŭeniradi tiel lerte ŝpinante identecon k universalecon, demokration k autentan egalrajtecon, informatikon k esperanton, respekton al si mem kiel al la aliaj. Jes ja, fin-fine: bonan venton al la "Nouvelles de la Francophonie" (Novaĵ-oj el la Francparolantaro) kaj ties Francoscopie (Francskopio), tiuj potencaj blovoj da pura aero je planedskalo, tiuj fortik-aj vakcinoj kontraŭ la eŭrocentrismo stulta k la lingva-kultur-a umbilikismo, ne malpli tia. Nur daŭrigu! (s) <u>André MARTIN</u>, Asocio Laboro-Amikeco-Kulturo(j), Namur (Belgio).

(El "LES NOUVELLES DE LA FRANCOPHONIE" n° 8, aprilo-majo 1995, kie cetere pledas por trilingveco S-ano Claude PIRON en Svisio: la surloka lingvo, unu pli vastkala laŭ la historiaj ligiloj (franca, angla, araba, svahila ...) k Esperanto. Jes ja, ĉu ne aparte plorinda, ke "<u>dum interafrika renkontiĝo</u> -atestas nia samideano- <u>la partoprenantoj dispartiĝas en inter si likimunajn grupojn laŭ tio, ke sia interkomunikada lingvo estas la angla, la franca aŭ la portugala</u>"?)!!!

KOPENHAGA MONDPINTO :




F.G.T.B.
ESPERANTO
A.B.V.V.

c/o ATAC
59 bis, rue A. Bastin
B-5000 NAMUR
(Belgio)

MONDSINDIKATISTO ESPERANTO

Pri la entreprenaj eŭrokomitatoj:

## NUR UNU PIEDO EN LA FORTRESON ...

Post la huraoj jen do dubojn kaj antaŭtimojn. Dum kolokvo en Blankenbergho ĉe Oostende, la tutlanda sekretario de ABVV-FGTB Jean-Claude/Ĵanklod/ Vandermeeren substrekis, ke la sindikatorganizaĵo ektaksas la malfacilaĵojn kaj sekve la urĝon pli efike organiziĝi - <u>ĉefe ĉe la bazo mem!</u> - sur la eŭropa nivelo. Pro tio oni ne atendu la mastrajn iniciatojn, kiuj neeviteble celos devojigi la ĝeneralan filozofion de la eŭrodirektivo, nome la organizadon de iu sociala dialogo. Oni tute male trudu al la mastroj, ke ili eniru en sistemon, kie eblos interdiskuti pri la dungara volumo, la strategiaj orientiĝoj, laboraj kondiĉoj, k.s. Estas ankaŭ la plej trafa rimedo por antaŭeviti, ke le alia flanko iam sukcesu ekflorigi malplimultajn - se eĉ malkaŝe domajn - klaskunlaborajn "sindikat"-etojn.

## PAŜOPOSTPAŜE EKLERNI LA SENLIMAN SOLIDARON

Tiu post le venko super tiujn unuajn malfaciliaĵojn estos ankoraŭ tiom da aliaj demandoj solvotaj. "Tutunue -precizigis K-do Vandermeeren- tiu en la lingvara uzado (!): "Kompreni, digesti ekonomiajn informaĵojn kaj sukcesi il-in pridiskuti en multlingva ĉirkaŭaĵo tute ne evidentas". Cetere, kiom fidindaj la sciigoj liverotaj de l'mastroj krom se kaze de kunvencio ebliganta la helpon de fakulo kaj trudanta la kvaliton de la informaĵoj?

Des pli nepros do, la informinterŝanĝoj inter la diverslandaj sindikatoj, ekstarigo de tuteŭropaj retoj por tio, ĝeneraligado de la intersidejaj kunvenoj kun zorga pretigado al la eŭrokomitatoj. Ne ĉiam facilas ele de sindikatoj kun malsamaj ideologioj, malsamaj sindikat-kulturoj kaj praktikoj (ekz.: la germana kunmastrado kaj pli "latina" -t.e. belga, franca ...- laborista kontrolo).

Tamen ja finfine devos ELkunlaboradi la eŭropaj sindikatoj: al ili la eŭrokomitatoj liveras neesperelan ŝanĉon kune laboradi, inter si ligilojn nodi.

## RESPONSIGI LA KONTRAUSTARANTOJ

Ĉiu eŭroregno devos pli malfrue por 1996.09.22 leĝfaradi por la entreprenaj eŭrokomitatoj, kies ĉefdomo (=ĉefsidejo) kuŝas sur ŝia teritorio. Ekestos do tiom da sistemoj kiom da ŝtatoj-membroj, sed ĉia sistemo aplikeblos al ĉiuj eŭrokomitattoj, inkluzive al tiuj el aliaj ŝtatoj-membroj.

La efikon tamen samvaloras la promeso! Ja definitive akirita jam estas la principo : Nenia plu ekranego-mastro aŭ matrijoŝko (=rusa pupo kaŝkovranta la ceterajn) muta sen la ĉefdoma (=ĉefsideja) permeso. Tutklare oni alfrontos la verajn, responsajn decidantojn.



SYNDICALISTES SANS FRONTIERES



***Internet,***
*your window on the world*


La tekniko tendencas unuigi la mondon, sed la homa menso ĝenerale ne evoluas laŭ sama rapido. La sennaciisma propagando celas restarigi la ekvilibron en la historia procezo.

(LANTI).




HIROŜIMO NENIAM PLU ! 1945-199

TEROŜIMO NE !






(El "Nudpieda Gen", Nakazawa Keizi, Rondo Gen).



# Korloke de l' luktoj

## MULTIGHU LA RUGHAJ STANDARDO

## KUN LA VERDA STELO !


ĉarnirloke de la laborista
kaj de la esperantista movadoj


M U L T I Ĝ U

N I A J R U Ĝ A J F L A G O J

K U N

L A V E R D A S T E L O ! !




Laŭ siatempa rekomendo de la Estraro de UEA ĉiuj Esperanto-flagoj konformiĝu al jenaj proporcioj :

Longeco : Larĝeco : Latero de la blanka kvadrato – 3 : 2 : 1.

Latero de la blanka kvadrato : Radio de la cirklo ĉirkaŭskribebla ĉirkaŭ la stelo – 10 : 3,5.